



# KONGA STELO

Etoile du Congo



*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj*

## Kongolandanoj aktivis dum la UK, P. 2



# Redakcie

*Joel Muhire*

**P**ost streĉa vojaĝo kaj kongresa ĝuo, mi trovas energion pretigi por vi la duan numeron de Konga Stelo (KS).

Kiam anonciĝis pri ebla okazigo de la tute unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko, en ĉiuj vekigis deziro partopreni ĝin... Bedaŭrinde multaj ne povis iri al Aruŝo pro nekapablo mempagi eĉ vojaĝdokumentojn! Danke al la malavara subteno de UEA, kongolandoj povis ĝui la kongresan etoson. Ili hejmenrevenis kunportante neforgeseblajn memorindaĵojn pri tiu UK, Honoré Sebuĥoro raportas mallonge pri tio ĉe la paĝo 5. Dum la kongresa semajno, kongolandoj montriĝis aktivaj, vidu la paĝon 2.

Post la UK, en la Oriento de Kongo-Kinŝaso naskiĝis sendependa asocio, Nova Sento, kiu intencas plifortigi la e-movadon en tiu landparto, Pastoro Bukuru Nabahena parolas pri tio ĉe la paĝo 9.

Ankaŭ Espoir Kasati rakontas pri sia vojaĝo al Eŭropo ĉe la paĝo 12.

Ni ankoraŭfoje disponas vin je leciono pri la svahila ĉe la paĝo 16. Profitu bone !

Ni bedaŭras pro la forpaso de niaj delongaj samideanoj: Jean Bosco Malanda el Kinŝaso kaj Augustin Momba Kuluba el Uvira. Kondolencojn!

Karaj kongolandaj samideanoj, ĉi tiu informilo estas via, ne hezitu sendi ĉiam ajn al la redakcio artikolojn pri viaj esperantaj agadoj. Krome, viaj amuzaĵoj, noveloj-rakontoj, poemoj, ktp. estas bonvenaj.

## Kiel sendi al *Konga Stelo* viajn artikolojn?

- Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.

- Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.

- Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!

- Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en formato RTF.

Viajn artikolojn sendu al [joelmuhire0@gmail.com](mailto:joelmuhire0@gmail.com) plej laste du semajnojn antaŭ ĉiu tria monato.

## Koran antaŭdankon pro ĉies kontribuo!



**DKEA:** Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

**DKEJO:** Demokratia Kongolanda Junulara Organiz, fondita en 1984.

**ILEI:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, fondita en 1984.





# Kongolandanoj aktivis dum la UK

*Joel Muhire – Goma/Norda Kivuo*

*Dum la UK, kongolandanoj aktivis per koncertado, instruado, akrobataĵo-ĵonglado, prezentado de filmo kaj prelegado.*

**A**lvenis finfine la tag', tiel komenciĝas la kongresa kanto de Joe Mo (Joel Muhire), "Bonvenon al la 109a UK". Junaj afrikaj esperantistoj, proksimume 200 el DR Kongo, Burundo, Kenjo, Madagaskaro, Benino, Togolando, Centrafriko, Sudafriko, Gambia ... partoprenis en la UK, ĵus okazinta en Aruŝo, Tanzanio. Ĉar tiu UK estis la unuafoja en la vico de universalaj kongresoj jam okazintaj, ĝi markis ian unikecon kaj certe estas mejlŝtona por pluraj UKoj estonte okazontaj en Afriko. Por plejparto de afrikaj esperantistoj, tiu UK estis la unua kongreso aŭ internacia e-renkontiĝo, miron kaj admiron oni povis vidi elradii el ĉies vizaĝo.

La peto pri tiu UK okazis en la 7a Afrika Kongreso de Esperanto (la 7a AKE), Buĵumburo, Burundo, en decembro 2019. Tiam la Afrika Komisiono decidis ke la unuafoja UK en Afriko okazu en 2023, bedaŭrinde en la samjara monato, ekturmentis la mondon terura malsano, kronviruso, ke ne plu estis

rajto ariĝi plurope! Estis nuligitaj ĉiuj kongresoj, internaciaj konferencoj, kristanaj kunvenoj, ... UEA trovis alternatvion, tio estas okazigo de virtualaj kongresoj, VK. Kiam mildiĝis tiu mondsdua malsano, la UK kiu devus okazi ĉeeste en Montrealo, Kanado en 2020 saltis al 2022, kaj la sekva alterne ĝis finfine venis la vico de la 109a UK en Aruŝo en 2024. Malgraŭ la normaligo de ĉeestaj kongresoj, UEA plu okazigas virtualajn kongresojn, nome VK ĉu en la fino de novembro, ĉu mezdecembre! Ĉi-jare okazos la 5a Virtuala Kongreso, de la 28a de novembro ĝis la 1a de decembro, kaj eblas aliĝi al ĝi per la jena ligilo: <https://vk.esperanto.net>.

La venontjara UKon gastigos Brno, Ĉeĥio, kaj jam eblas aliĝi al ĝi, vidu: <https://uk.esperanto.net/2025/>.

## Kongolandanoj en la UK

Okazis anticipe la 2a Afrika Kongreso de Virinoj (la 2a AKVo) antaŭ la formala malfermo de la

109a UK, partoprenis en ĝi kongolandaninoj, i.a Alexandrine Omba.



DR Kongo estas konata kiel forta lando e-movade de pluraj jardekoj, tio pruviĝas per bona esperanta lingvokapablo de kongolandoj, kaj sindona instruemo de Esperanto diversregione tra la lando. Dum la UK, Joel Muhire instruis Esperanton al novuloj per sia libro Kiesperanto Kwetu. Partoprenis en la kurso kenjanoj, tanzanoj, burundanoj, kongolanoj kaj azianoj, do Joel devis instrueti samtempe la sŭahilan al la azianoj.

Krome, li plezurigis la partoprenantojn dumbankede per du kantoj, lian kanton "Bonvenon al la 109a UK", specialan por tiu unuafoja UK en Afriko preskaŭ ĉiuj kongresanoj scipovis kunkanti, mirinde!

La diversstila koncerto de Joe Mo (Joel Muhire), kunkantante kun Miriam Alliance kaj Chris Freddy estis plezuriga, emociveka kaj kortuŝa samtempe. La triopo prezentis bonvenigan kanton unue, poste kantis ĉefe pri paco kiun la mondo nuntempe urĝe bezonas, kaj admonis ke «ni provu vivi laŭ la interna ideo de Esperanto por pli paca mondo». Ĉiuj spektantoj de la

koncerto emociiĝis je iliaj kantoj, precipe kiam ili finprezentis la kanton: "milit-tempe". La triopo ankaŭ dediĉis specialan kanton al AVE, Asocio de Verduloj Esperantistaj, kun titolo "Ni protektu la naturon". Ili prezentis ankaŭ kantojn pri Esperanto, kiel ilo de paco.



Post la koncerto de la triopo, Kambale Amani Love (Lov-amo), unu el la porpacaj kongolandaj artistoj surscenejiĝis, etendis Kongolandan flagon kun kandeloj ĉe la kvar pintoj, akompane de melodioj prezentis monologan teatraĵon kun interesa mesaĝo pri suferoj dum militaj tempoj kaj soifo pri vera paco. Ĝi kortuŝis ĉiujn, ke unu esperantisto ŝatus ke Kambale prezentu tiun teatraĵon en sia lando. Li konvikiĝas ke tia teatraĵo kian li prezentis povas esti "ilo por ŝanĝi la mondon". Poste, li distris nin per akrobataĵo-ĵonglado.

La 6an de Aŭgusto, Moses Byamungu prezentis sian tuthoran koncerton iel mirindan: li enpaŝis koncertejen per konglanda tradicia

danco, kaj poste vivkantis sep esperantajn kantojn (Saluton, Ĵaluza, Edukado, Pardonu, Grava oportuno, Amikeco, Amo estas paco). La plej ĝojinda kanto kiun la spektantoj multe ŝatis pro ĝia grava mesaĝo estis "AMO ESTAS PACO". Finkoncerte, Moses eliris de la salono per alia kongolanda tradicia danco.

S-ro Dankon Kwibe prezentis sian novan filmon, *la forlasita virino*.

Junaj gesamideanoj el Goma, Djofina Mungoy kaj Michael Bimenyimana deklamis belajn poemojn, trafe!


Dum la kongreso, la kongaj esperantistoj kunsidis por preparoli la organizadon de la kongolanda e-movado, partoprenis en ĝi eĉ kamaradoj el la okcidento, inter kiuj s-ro Arlain Kizeyidioko reprezentis DKEA-n, la Landan Asocio de DR

Kongo. Surprize, alpaŝis eksterafrika samideano, kaj subtenis la reorganizadon de la Konga E-movado per 50 eŭroj, dankinde, ĉu ne?

Ni notu ke laŭtlegis la kongresan rezolucion sinjoro Espoir Kasati el Lubumbaŝi !

Post la UK, ni hejmenrevenis kun nova forto por la movado: Joel Muhire daŭrigas volontulan pervacapan e-instruadon, tamen kadre de UEC, la Universitato de Baraka, funkcianta en Suda Kivuo. Liaj lernantoj estas el DR Kongo, Tanzanio, Kenjo kaj Burundo, entute 95 personoj.

Sinjoro Pastoro Bukuru Nabahena, iniciatis sendependan asocion, Nova Sento kun la celo promocii Esperanton en la oriento de Kongo-Kinŝaso, pri tio vi legos pli detale ĉe la paĝo 9.



### Pri Moses Byamungu

Moses Byamungu estas muzikartista komponisto de kantoj en Esperanto, Franca, Angla kaj svahila. Li kantas multe pri paco kaj en la esperanta muzika kario li kreis sian propran muzikstilon kiu estas regetono, regeo, afrobeat, kaj amapiano... Li estas unu el la plej aktivaj esperantistoj en la urbo Bukavu, li estas kunordiganto de la faka asocio nomata "Komitato por la Promocio de Virinoj kaj Infanoj en Kamparaj Regionoj (COPROFER a.s.b.l). Aldone, li estas ankaŭ la fondinto de la esperanta klubo en Bukavu, nome Panzi Esperanto-klubo.

Kontakto : [mssbyamungu@gmail.com](mailto:mssbyamungu@gmail.com).



## **LAKONE PRI LA 109-A UK**

**Honoré Sebuho – Rutshuru/Norda Kivuo**



**O**fficiale, la 109-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio okazis je la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 2024 en la turisma urbo Aruŝa, Tanzanio. Ni, Nord-Kivuanoj vojaĝis laŭ la itinero: Rutshuru – Goma – Ruando – Suda Kivuo/ Demokratia Respubliko – Burundio – Aruŝo/ Tanzanio; estis longega kaj tre laciga busvojaĝo. En Aruŝo ni estis bone akceptitaj de la loka tanzania popolo. Tanzanio estas paca, unuigita kaj gastama lando. Mi mem tro aprezis tiun orientafrikan landon ĉar neniu el inter ni estis ĝenita dum la periodo de la UK. Al Tanzanio ni ĵetas florojn! Estas vere, ke Aruŝo estas turisma urbo ĉar ĝi enhavas sufiĉe da muzeoj por viziti, naciajn

parkojn kiel Ngorongoro, Serengeti, Manyara, Tarangire, Kilimandjaro, Mikumi, ktp. Alveninte al AICC-ejo (Aruŝa Internacia Konferenca Centro), sabate la 3-an de aŭgusto 2024, ĉiu partoprenanto ricevis sian kongreslibron kie estis ĉiuj diversaj programeroj pri la semajna aktivado kaj saketon kun la vortoj kaj emblemo **"109-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO"**

Tiun saman tagon, vespere, ni partoprenis en la movada foiro. Estis diversaj Esperanto-asocioj kiuj prezentis kaj elmontris siajn belajn Esperantajn artikolojn, aliaj prezentis siajn vestaĵojn kun Esperanta emblemo. Inter tiuj Esperanto-asocioj, jen estas kelkaj:

### **- Universala Esperanto Asocio (UEA)**

La respondeculo prezentis revuojn kaj librojn eldonitajn de tiu asocio mem. Tie sufiĉe da esperantistoj ricevis donacojn de gramatikaj libroj, revuoj, flugfolioj kun informoj pri la venonta kongreso kiu okazos en la belega urbo BRNO la 19-an – 26-an de julio 2025 en Ĉeĥio.



## - **Esperantic Studies Foundation (ESF)**

Ĉi tiu angla nomo esperante estas: Fondaĵo pri Esperanto-Studoj. Ĝi estas neprofitcela organizaĵo de volontuloj kreita en 1968. Tiuj volontuloj ĉiufaje faras financajn kontribuojn por subteni iujn esperantajn projektojn tutmonde. La reprezentantoj de tiu asocio klarigis al ni siajn E-agadojn jam faritajn dum ĝia kreado. Ili disdonis senpagajn ESF-metaltajn insignojn, informfoliojn kun ĝia vizio, objektivo kaj areo de interveno. Ili finance subtenas asociojn, kiuj havas bonajn, fidindajn projektojn.

## - **Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF)**

Ĉi tiu asocio faras elektronikan komercon tra la tuta mondo. Ĉiuj rajtas aliĝi se eble kaj ekkomerci kun okcidentaj kaj afrikaj landoj. Al ni estis donacitaj vizitkartoj pri IKEF. Tiu asocio alvokas ĉiujn esperantistojn praktiki elektronikan komercon.

Dum la ceteraj tagoj de mia restado en Aruŝa mi partoprenis en pluraj aranĝoj de la kongreso:

En miaj pensoj, mi imagis, ke la Universala Esperanto-Kongreso ĉiam okazas en la sama pluruza ĉambro dum la planita semajno. La programoj estis bone difinitaj por ĉiu tago, horo kaj minuto. Iafaje la

programeroj de la diversaj esperantistaj paroladoj okazis sen nia scio. Estis en la 4-a tago, ke iuj povis malkovri tion kaj komencis adaptiĝi al la ĉiutagaj planitaj tempoj.



Merkredon, **la 7-an de aŭgusto**: okazis ekskurso. Mi estis elektita kiel interpretisto kiam ni direktiĝis al la « Tanzanite Muzeo ». Tie mi akompanis teamon de esperantistoj, kaj interpretis la svahilan lingvon en Esperanton. Tie oni vendas tanzaniajn artobjektojn, rafinitajn kaj nerafinitajn valorajn ŝtonojn: tanzanito, kvarco, ktp.

Sabaton, **la 10-an de aŭgusto** ; okazis la “Solena fermo” de la kongreso en la ĉambro Zamenhof kun partopreno de tanzaniaj lokaj aŭtoritatoj kaj esperantistoj. La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Duncan Charters deziris al ni bonan renkontiĝon en la venonta kongreso okazonta en la urbo BRNO en Ĉeĥio, la 19-an – 26-an de julio 2025. Post tiu solena fermo estis disdonitaj T-ĉemizoj kun jena surskribaĵo:

"Hakuna Matata- Neniu Problemo".

**AFRIKO, MULTTALENTA KAJ MIRINDA KONTINENTO****Malekera Bonne Idee – Uvira/Suda Kivuo**

**A**friko estas multtalenta kaj mirinda kontinento! Kiel vi scias, ĝi havas por tutmonda ekvilibro kaj sanrestarigo rimedojn, same kiel movadkadre, ĝi havas fortajn kaj aktivajn gejunulojn talentajn pri arto, ŝercado, verkado ...

**Absurda noveleto:  
La kato venigita el Germanio afriken**

Post jardekoj, ĉi-jare en 2024, okazis en Tanzanio, Afriko la neforgesebla kaj memorinda historia evento, la 109-a Universala Esperanto-Kongreso, kun ĉiuspecaj prelegoj, aventuroj, distraĵoj kaj amikiĝoj.

Iu esperantisto sukcese konatiĝis kun iu afrikano el DR Kongo dum tiu UK. Komence, la germano ne plene fidis tiun afrikanon ĉar estis ilia unua fojo amikiĝi. Sed la germano havis problemon. Li loĝas en sia lando kun kato nomata "Ne tuŝu min". Tiu kato ĉiam turmentas lin, ĉiam kaŭzas problemojn por la najbaroj. Kiam la germano kaŝas manĝaĵon en la potoj kaj post foriro al la laboro, la kato malfermas ilin

kaj komencas manĝi. Vespere, la germano revenas hejmen, tre laca kaj malsata, malfermas la potojn por entelerigi la manĝaĵon. Uf! La potoj malplenas! Dume, la kato sidas apud li rigardante lin kun malfermitaj okuloj. Li demandis

"kiu malplenigis la potojn je manĝaĵoj?" » "Mi ne scias, eble la aero"

respondis la kato. La germano denove demandis:

"Kiu malplenigis la potojn de manĝaĵoj?"

"Mi ne scias, eble la aero kiu estas ene de nia domo" respondis la kato.

Kolere la germano fermas la pordojn kaj la fenestrojn por ekkapti tiun aeron. Li ekmovas siajn longajn brakojn supren kaj malsupren por kapti la aeron, longe parolante al si mem: "atendu, vi perdita aero sen iu vivejo, mi kaptos kaj kuiras vin".

La kato ridetis. Tion la germano rimarkis kaj diris al la kato: "do vi observas kion mi faras anstataŭ ol helpi kapti tiun aeron"! La kato estis tute malvirta. Ĝi eĉ ŝteladis aĵojn de la najbaroj. La germano ricevis multajn plendojn pri damaĝoj





kaŭzitaj de sia kato. Li estis laca pro ĝia abomena sinteno. La germano rakontis ĉion ĉi al sia afrika amiko kaj iam li decidis enaviadiligi la katon al Afriko, kie ĝi estus edukita en nur 2 semajnoj.

En iuj partoj de Afriko, anstataŭ ol prizorgi katon, aŭ hundon, kiam ĝi

eraras, ĝi estas punbatata ĝis edukiteco, tiel diris la afrikano!

"Ĉio, kio estas neebla ie, eblas en Afriko". *Afriko estas mirinda kontinento kun multaj talentoj.*

### -- HUMURAJĴOJ --

Iam stultulo vizitis restoracion. Alveninte, li turnas sin al la kelnero kaj petas manĝaĵon. Subite, alia stultulo alvenas kaj, vidante la unuan stultulon, li demandas al la kelnero:

Sed, kial vi donis manĝaĵon al stultulo?

La unua stultulo reagis: kiun vi taksas stultan? Estas vi kiu estas stulta!

Ĉar vi rifuzas, ke vi ne estas stulta, reagis la unua stultulo, diru al mi tion, kion mi levprenas [li levprenas ŝtonon kaj montras ĝin al la alia stultulo]. Responde, la dua respondas: tio estas aŭto!

Hahaha, bone, vi korekte respondas ĉar tiun aŭton vi vidis kiam mi levprenis ĝin, konsent-respondas la demandito!...


***Pastoro Bukuru Ruburaga Nabahena***

---

## Helppeto

Semajnon post hejmenreveno de la kongreso, la patro de Joel Muhire, pastoro Ndaziboneye Salomon (KN: 525) eksuferis prostaton. Lia sanstato estas tre malbona, kio maltrankviligas la familianojn. Ili ekpensas ke helpa alternativo estus sendi lin al burundaj specialistoj! La familio petas ĉies helpon kaj antaŭdankas vin!

Sendomaniero: al Banka Konto de Elie Havugimana: TMB, numero : **1272-2352875-00-18** aŭ al UEA: **jmhr-a** kun mencio: por kuracado.



# NOVA SENTO

***Pastoro Bukuru Ruburaga Nabahena –  
Uvira/ Suda Kivuo***

**"Nova Sento" estas vacapa forumo kiu arigas orientkongajn esperantistojn. Ĝi ne estas ankoraŭ formala E-asocio, sed laŭkaze, ĝi povos estonte pli malpli formale strukturiĝi. Jen ĝia malneta laborplano**

**L**a celo de Nova Sento estas unuigi esperantistojn el la oriento de DR Kongo por instigi al pli da aktivado por progresigi Esperanton en tiu landparto. Jen kelkaj konkretaj agadoj farindaj por atingi nian celon:

- 1) Instrui Esperanton: Ĉiu el ni devas strebi daŭre vigliĝi en la instruado de Esperanto en sia vivejo. La instruado povas okazi ĉeeste aŭ virtuale, t.e per vacapo. La nombro de kursanoj ne gravas, eĉ al nur 3 interesatoj Esperanto estu instruata. Tiu agado estas la fundamento kaj pruvilo de nia vigleco ĉar sen instrui Esperanton, ne eblas efektiviĝi la ceterajn agadojn.
- 2) Okazigi periodajn diskutrondojn: Instruistoj kelkfoje organizu diskutrondojn kies partoprenantoj estu iliaj respektivaj kursanoj kaj surlokaj esperantistoj.



Partoprenantoj kaptu okazon diskuti, interparoli, interŝanĝi ideojn pri iu antaŭfiksita temo gvidota de la instruisto. Tiaj parolaj praktikoj kontribuos en rapida plibonigado kaj mastrumado de la lingvokono de la partoprenantoj. La diskuttemo rilatu al Esperanto. Krome, necesas, ke ĉiu grupo havu lernolibron. La verkaĵo de Joel Muhire, KIESPERANTO KWETU ekzemple, povas utili. Cetere, se Joel povus pretigi ankaŭ francversian lernolibron tio povus multe helpi.

- 3) Estigi bibliotek(et)on: Ĉiu E-grupo klopodu havi bibliotek(et)on kiu ebligu al siaj membroj plimaturiĝi lingve kaj ankaŭ helpu ilin pliinformiĝi kaj plikleriĝi niamovade. Lernolibroj, broŝuroj, libretoj, ktp estu petitaj el diversaj E-instancoj, asocioj kaj unuopuloj tiucele. Laŭeble, ni elŝutu iujn dokumentojn el E-retpaĝoj.

4) Diskonigi kaj propagandi pri Esperanto: Ĉiuj grupaj kaj individuaj membroj de nia forumo Nova Sento havu kroman devon diskonigi Esperanton kaj propagandi pri ĝi diversmaniere laŭ la surlokaj oportunecoj kaj eblecoj. Tiurilate, ni konsideru inter alie: kunporti T-ĉemizojn kun skribaĵoj pri Esperanto, promeni grupe parolante Esperanton kaj, laŭeble, kunportante E-flagojn, aranĝi radioelsendojn ĉe lokaj radioj, pretigi folietojn kun diversaj instigmesaĝoj pri Esperanto kaj ilin dissendi al neesperantistoj, ktp.

5) Utiligi Esperanton: Ĉar multaj homoj en niaj lokaj komunumoj ne ankoraŭ konsciiĝis pri la utileco de Esperanto, ni do aktivigu en la estigado de priutiligaj aktivecoj, eĉ modestaj, kiuj montru sin utilaj al ambaŭ lokaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Tio eblas per diversfacetaj E-agadoj, kiel la estigo de sporta agado kies ludantoj kunportu priesperantajn lanbluzojn; muzika grupeto kies kantoj estu en Esperanto kaj aliaj en lokaj lingvoj instigante homojn interesiĝi pri Esperanto, socialhelpaj aktivecoj kies profitontoj estu esperantistoj kun iliaj respektivaj familioj kaj ankaŭ la lokaj komunumanoj (etaj monpruntadoj al esperantistoj cele al modestaj lokaj komercadoj aŭ al establigo de modestaj enspezigaj aktivecoj por la plibonigado de la familia vivkondiĉoj, ktp); korespondado inter diverslokaj

esperantistoj tra la tuta orienta landparto kaj eventuale okazigi reciprokajn vizitadojn; korespondado kun eksterkongaj esperantistoj; ktp, ktp. Kio s-anoj Joel Muhire kaj Byamungu estas farantaj nun kadre de E-muziko estas ja kuraĝiga kaj imitinda de ceteraj muziktalentaj orientkongaj esperantistoj!

6) Aperigi Informilon: Feliĉe, tiu ĉi agado jam iel ekzistas. Temas pri la revuo publikigata de s-ano Joel Muhire (el Goma), nome *Konga Stelo*. En ĉiu lanĉota numero aperu skizan raporton fare de ĉiu agadanta E-grupo aŭ unuopulo. Tiel ni diskonigu niajn farojn al superaj instancoj: UEA, ILEI kaj sub-instancoj: DKEA, ILEI-sekcio, Afika Komisiono, ktp. Niaj bezonoj kadre de niaj agadoj ankaŭ aperu en la revuo. Aliaj neatenditaj okazaĵoj same aperu tie, ekzemple, kaze de naturaj katastrofoj, militoj en kiuj esperantistoj ankaŭ viktimiĝis, ktp. Plie, la revuo servu al ni kiel reklamilo pri eldonitaj E-libroj, E-filmoj, E-muzikaĵoj, ktp.

Laŭeble, la revuo ne estu loko nur por niaj agadraportoj kaj reklamiloj sed ankaŭ servu al ni publikigi niajn anoncetojn pri nia intenco konatiĝi kaj amikiĝi kun eksterlandaj samideanoj.

7) Okazigi tut-Orientajn E-aranĝojn: Almenaŭ unu fojon jare devas okazi komuna E-aranĝo (seminario, kongreseto, ktp) per kiu ties esperantistoj renkontiĝu,



konatiĝu kaj ĉeeste interŝanĝu kaj diskutu pri la vivo de nia Orientkonga movado. Ceteraj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj estu invitataj partopreni la eventojn.

8) Partoprenigi Orientkongajn esperantistojn en diversaj enlandaj kaj eksterlandaj E-eventoj): Laŭeble, Orientkongaj esperantistoj strebu partopreni diversajn enlandajn kaj eksterlandajn E-eventojn, iu parte, fare de niaj propraj monrimedoj, kaj, aliparte, dank'al subvencioj kaj mondonacoj el UEA, E-fondusoj kaj asocioj kaj el bonkoraj eksterlandaj samideanoj. La gvidantaro de nia forumo klopodu kontakti la koncernatajn E-instancojn kaj diversajn inuopulojn tiucele.

9) Monkotizi: La membroj de nia forumo sentu sin devigataj kotizi ĉiumonate iom da mono, laŭ la interkonsentota monkvanto, por la antaŭenpuŝado de niaj movoj. Neniu grupo povas sukcese atingi sian celon sen kotizoj. Rilate tiun specifan temon ni pridiskutos poste.

10) Estigi dumvivan enspezigan projekton por la Orientkonga movado: Kotizoj estos daŭre postulataj de la membraro de niaj forumanoj. Ĉar iam ni hazarde povos travivi defiojn tiukadre kaj sekve ne plu daŭrigi kun nia movado kiel dezirinde; por eviti tiun eventualaĵon, povas esti bone pripensi kumunan, daŭripovan

enspezigan projekton pri kiu ni povas kotizadi por ĝia finfina efektiviĝo. Helpe de ĝiaj enspezoj, la tuta Orientkonga movado povas havi eblecon daŭre memfinanci siajn bazajn agadojn, eĉ se ne temos pri ĉiuj aktivecoj. Cetere, eksterlandaj helpopetoj (ĉe UEA, Afrika Komisiono, fakaj E-fondusoj, unuopuloj, ktp) povas esti lanĉitaj tiucele. Kaze la projekto jam establiĝis, eĉ partoprenigi iujn samideanojn al enlandaj kaj regionaj E-eventoj samkiel bazaj subvencietoj al agadantaj unuopuloj ne plu povas esti cerbumenda afero !...

Ĉiu bonvolu alporti pliajn kontribuojn (ideojn, sugestojn, korektojn, ktp) por la pliriĉigo de tiu ĉi laborplano !...

Nova Sento  
en  
Orienta DR. Kongo

## **Vojaĝo Eŭropen: Alveno en Svedion, kelkhora intervjuo!**

*Espoir Kasati - Lubumbaŝo*

**E**stante unu el la gajnintoj de la konkurso *partoprenu IJK-on*, tuj post la unua Universala Kongreso en Afriko mi devis iri al internacia junulara kongreso kiu okazis de la 18a ĝis 25a de Aŭgusto 2024 en Ŝventoj/Litovio. Tamen, pro grava iama kontribuo al gotenburga esperanto-revuo “Ora ĵurnalo”, pro volo de svedaj gesamideanoj, mi devontigis min viziti Svedion ĉu antaŭ aŭ post la IJK. Pro tio, ke Litovio estas pli for de Svedio ol de Aŭstrio, lando kiun mi devis ankaŭ viziti, endis unue vojaĝi al Svedio kaj renkontiĝi unue kun svedespoj (svedaj esperantistoj).

Petinte vizon, la konsulino menciis, ke lando kie mi longe restos estu la enirlando, kion mi ne menciis pleniginte la retan formularon do mi devis eniri ŝengenon tra Litovio kaj ne tra Svedio. Nur tio estis la kaŭzo de mia kirliĝo ĉe la policejo. Konstantinte tion indikita en mia vizo, la oficiro ĉe la migrad-oficejo devis telefoni al policisto por decidi pri tio kvankam mi havis rajton eniri ŝengenon, sed ne devus esti unu en Svedion.



Mi estas poligloto, sed tamen, mi pensis ke bezono de tradukisto iom helpas anstataŭ uzi la anglan lingvon en la policejo.

– Kara, kiun lingvon vi plej bone regas? Demandis la policisto.

– La francan mi regas, sinjoro, mi respondis.

Mi komprenis, ke li alparolis al kunlaborantino pri urĝa bezono trovi tradukiston de la franca.

Apud mi kara amiko iris tien kaj reen, svede parolonte, klarigante ĉiujn detalojn, sendube min defendante, tiu estas Martin Strid, mia sveda invitanto. Post momento, min kondukis en la oficejon la policisto kie mi devis unue legi kelkpaĝan regul-broŝuron por ne fuŝigi aferojn.

Serioza, kvazaŭ furioza, strikta kaj precipe aŭskultema demandis min la oficiro angle: – ĉu vi ĉion

komprenis en la broŝuro? – Jes, mi respondis.

Li ŝaltis laŭtparolilon de la oficejo-telefono kaj aŭdiĝis ina voĉo! La policisto dekstre parolis svede, kunlaborantino skribis komputile maldekstre, la tradukistino tradukis al la franca ĉion por mi.

– Kiam mi parolas, ne interrompu min, kiam la tradukistino parolas ne interrompu, silentu kaj venos via vico paroli.

– Jes, mi respondis post traduko.

Venis pluvo da demandoj kaj ĉiam nur je mia vico devis parolis. Fine pri la celo de mia vojaĝo al Eŭropo :

– Kial vi venas en Eŭropon, demandis la policisto.

– Por partopreni la internacian junularan kongreson de junaj esperantistoj en Litovio, mi respondis.

Anstataŭ tuj traduki al la oficisto, la tradukistino demandis : Ha, vi estas esperantisto ? Mi respondis – jes!

Post tiu respondo, aliajn klarigojn pri esperanto kaj esperanto-eventoj faris la tradukistino mem al la policisto. Ŝi prenis almenaŭ du minutojn klarigante kaj mi nur komprenis la vorton esperanto.

Tuj mi konjektis, ke la tradukistino estas ĉu esperantisto aŭ interesiĝas pri esperanto!

Fina demando estis : – Ĉu vi planas reveni hejmen post tiu kongreso ?

– Jes, mi respondis.

– Bone, dankon, diris la policisto kaj ni tuj eliris. Li petis fari kopion de ĉiuj miaj dokumentoj, poste mia

pasporto ricevis stampon kaj ni eliris ĝojante. Martin Strid manpremis al mi kaj diris gajmenie: kara, bonvenon en Eŭropon!

## Vizito en Stokolmo

Mi kaj Martin Strid prenis trajnon al Stokolmo. Devis en la stacidomo sekurigi niajn pakaĵojn kaj poste daŭrigi nian vizitaĉon. Estis vere mojose viziti tiun riĉan je historio belan urbon. Vizitis malnovajn kvartalojn, germanan preĝejon, reĝan palacon, plurajn multsignifajn monumentojn, la urbodomon, la parlamentejon preterpasis, muzeojn; kafumis, manĝetis, ripozis cerbumante, estis mia unua fojo reale vidi metroon. Tre amuzis min, ke homoj ne salutas unu la aliajn. Kvankam laca post plurhora aviadilumado eŭropan, mi tamen ĝojis viziti tiun urbon.



En Stokolmo ni vizitis neniun esperantiston, sed ja vizitis multon kaj plej grave, gustumis la svedan malsekan panon, kiun multe manĝinte donas bonan dozon da furzado. Martin Strid estis tre



klarigema, iama loĝanto de tiu urbo, li ĉiam klarigis pri ĉio nova aŭ malnova atentokapta aŭ historia. Ĝis la 5a posttagmeze ni devis reiri stacidomen por atendi fratinnon de Martin Strid unue por ekkoni unu la alian kaj due por transdoni al ŝi fruktojn aĉetitajn el Aruŝo. Ŝi alvenis, kvankam la ŝloskodo de la valizo kostis al ni pricerbumadon kaj tempon post forgeso de ĝi, mi sukcesis malŝlosi la valizon je nia ĝojo kaj transdonis naturajn afrikajn fruktojn. Iom poste, ni enrajniĝis al Borlänge, hejmurbeto de Martin Strid.

En trajno ludadis fraŭlino el Rūando sur sidloko kontraŭ mi, mi ĝojis vidi ŝin sed ŝi vestis tute eŭropece, kio iom kompleksis min. Mi salutis al ŝi rŭande kaj iomete konversaciis. Eblis iometa konversacio ĉar mi komprenas la rندان lingvon ĝis 40% pro tio, ke ĝi iom similas mian dialekton! Estis interese vidi kiom nenombreblaj estas la riveroj kaj lagoj de Svedio. Bona ĉirkaŭa naturo, bela pejzaĝo, ĉiuj parolis svede!

## Restado en Borlänge

Mia gastado en la sino de la hejmo de Martin Strid estis pure hejmeca. Kun ĉarma, bonkora, bonhumora edzino, mi tuj konjektis ke mi ja gastas en bona familio. Frial Strid estis sufiĉe fratina al mi. En domo regis etoso lingva – mi kun Frial

parolis angle, ĉiuj krom mi foje parolis svede kaj foje eritree krom mi kaj Martin Strid nur Frial kaj siaj geinfanoj. Ni vizitis apudan parkon. Mi spertis, ke infanoj prilaboras sian menskapablon penante trovi padon en arbaro. Martin diris al mi ke estas bone eduki infanojn tiamaniere por ke ili elvolu la lerton eĉ en kuranta vivo povi trovi solvojn mem. Alia instrumaniero tute ne antaŭimagita ĉe mi.

Poste min invitis al sia biblioteko kaj diris : elektu librojn taŭgajn kaj utilajn por via esperanto-klubo en Lubumbaŝo. Mi ĝuis elekti zorgante pri la pezo de la valizoj!



## Mia restado en Gotenburgo

Ĉarma urbo, kun ia nombro da esperantistoj gastigis min. Ĉe Siv Burell, kune kun la familio de Martin Strid, mi ĝuis mian alvenon jam preskaŭ je noktomezo. Pluan tagon post matenmanĝo ni kune iris al la urbocentro kie ni renkontiĝis kun aliaj gotenburgaj geesperantistoj, honoraj gastoj el la unua UK en afriko estis varme bonvenigataj.

Mi kaj Martin prelegis pri la Universala Kongreso de Aruŝo kaj ĝiaj bonaj okazaĵoj, foje Siv tradukis

sveden por komencantoj. Post prelegoj ni, la honoraj gastoj ricevis premietojn honore al nia laboro kaj poste estis tempo ekskursumi tra Gotenburgo. Unue perpiede tra la stratoj de gotenburgo kun trafikaj klarigoj pri la vidindaĵoj, poste iris al esperanto-placo, kie ni povis trinkumi kaj manĝumi. Sekve estis tempo por ni ĉiuj ŝip-ekskursi. Pluan tagon mi devis flugi al IJK, do, mi posttagmeze iri kun Siv al esperanto-biblioteko Stannum kie mi ĝuis observeti tuŝante, foliumante esperantaĵojn.

## LA NATURO

Dormas mi silente  
Spiras freŝan aeron  
Promenante en herbejo,  
Flarante bonan naturodoron,  
Gustante naturajn pomojn,  
Produktitajn de la senvenenaj  
arboj.  
Ho, la naturo !  
Kun amikoj turismumas en vi,  
Florsezone.  
Ĝuante la guston de la pluveto,  
Tuŝante rozkoloritan floron de la  
Kreinto!  
Aprezu la naturon!  
Protektu la naturon!  
Imagas mi oferti al esperantistoj:  
Verdajn florojn pac-simboligajn,  
Ruĝajn florojn simboligantaj  
profundan amon.

Tra la naturo  
Konatiĝis mi kun  
teranoj.  
Marŝas laŭ via ritmo,  
Via-ritme ni ĉion faras.  
Marŝas ni libere sub la lunlumo,  
Promenas frumatene apud  
rivero,  
Ekvidas ni la aŭronon.  
Kiu admirigas nin pri vi.  
Bela vi estas, la naturo!  
Kia ĝojo estu el esperantistoj  
Kiuj ĉiam volas vin protekti?  
Mirinde, sentas nin plonĝi  
rivereten.  
Ho! Admiras ni vin kaj protektas  
vin.



**Jean de Dieu Kikako - Goma**

## SKRIBO KAJ PRONONCO DE LA SŬAHILA

## A – LA ALFABETO DE LA SVAHILA:

En la svahila alfabeto ĉiu sono aŭ fonemo estas transskribita per distinga literumo (letero aŭ grupo de literoj). La svahila alfabeto inkluzivas:

- 23 simplaj literoj: **a, b, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, v, w, y, z.**
- La literoj **q, x**, ne estas uzataj. La litero **c**, kvankam ĉeestas, neniam estas uzata memstare.
- 9 kunmetitaj literoj: **ch, dh, gh, kh, ng', ny, sh, th, ts.**

## 1. VOKALOJ:

Skribo	Fonemo	Ekzemplo	E- ekvivalento
<b>A, a</b>	[a]	Baba (patro)	Lama (kilema)
<b>E, e</b>	[e]	Pete (Ringo)	Eble (labda)
<b>I, i</b>	[i]	Kiti (Seĝo)	Filo (mwana)
<b>O, o</b>	[o]	Moto (Fajro)	Ondo (wimbi)
<b>U, u</b>	[u]	Kuku (Kokino)	Usono (Marekani)

Kiel vi povas rimarki en ĉi tiu tabelo, la svahila havas **5 vokalojn**. Ili proponas neniun malfacilaĵon por esperantisto.

## 2. SINSEKVAJ VOKALOJ:

Same kiel Esperanto, ĉiu vokalo konservas sian propran valoron.

**Ekzemple:**

**ou** estas prononcata "o-u"

**eu** estas prononcata "e-u", ktp.

Ni ankaŭ ofte renkontas la saman duobligitan vokalon en la svahila: necesas tiam plilongigi la vokalon:

**Naam!** (= Jes ! Jen mi estas !)

**Jogoo** (= koko).

**Juu** (= supro, sur)

**Kuu** (= ĉefa, granda)

**Mzee** (= maljunulo)



### 3. DUONVOKALOJ:

Skribo	Fonemo	Ekzemplo	E- ekvivalento
<b>W, w</b>	[w] sonas kiel ŭ	<b>wewe</b> (vi)	Ankaŭ (pia), w= ŭ
<b>Y, y</b>	[y] sonas kiel j	<b>Yeye</b> (li, ŝi)	Jesuo (Yesu)
<b>I, i</b>	[i]	<b>Kiti</b> (Seĝo)	Stiri (kuendesha gari)

### 4. SIMPLAJ KONSONANTOJ:

Skribo	Fonemo	Ekzemplo	E- ekvivalento
<b>B, b</b>	[b]	<b>Baba</b> (paĉjo)	Bebo (infaneto)
<b>D, d</b>	[d]	<b>Dada</b> (fratino)	Diri (kusema)
<b>F, f</b>	[f]	<b>Kufaa</b> (taŭgi)	Fari (kufanya)
<b>G, g</b>	[g]	<b>Gari</b> (aŭto)	Gasto (mgeni)
<b>H, h</b>	[h]	<b>Haya!</b> (Bone!)	Horloĝo (saa)
<b>J, j</b>	[ĝ]	<b>Juu</b> (supro)	Ĝibutio (lando)
<b>K, k</b>	[k]	<b>Kuku</b> (kokino)	Kolo (shingo)
<b>L, l</b>	[l]	<b>Lala!</b> (dormu!)	Larmo (chozi)
<b>M, m</b>	[m]	<b>Mama</b> (mama)	Miri (kushangaa)
<b>N, n</b>	[n]	<b>Na</b> (kaj, kun)	Nun (sasa)
<b>P, p</b>	[p]	<b>Paĉjo</b> (papa)	Peti (kuomba)
<b>R, r</b>	[r]	<b>Rangi</b> (koloro)	Resti (kubaki)
<b>S, s</b>	[s]	<b>Saa</b> (horloĝo)	Semi (kupanda)
<b>T, t</b>	[t]	<b>Taa</b> (lampo)	Taso (kikombe)
<b>V, v</b>	[v]	<b>kuvaa</b> (surmeti)	Vendi (kuuza)
<b>Z, z</b>	[z]	<b>-zuri</b> (bela)	Zamenhof

### 5. KUNMETITAJ KONSONANTOJ:

Skribo	Fonemo	Ekzemplo	E- ekvivalento
<b>Ch, ch</b>	[ĉ]	<b>chai</b> (teo)	Serĉi (kutafuta)
<b>Dh, dh</b>	[ĉ] proksimuma z	<b>Dhabu</b> (oro)	Zamenhof
<b>Gh, gh</b>	[R], proksimuma g	<b>Ghali</b> (alkosta)	Gasto (mgeni)
<b>Kh, kh</b>	Proksimuma ĥ	<b>subalkheri</b> (bonan tagon)	Ĥoro (kwaya)
<b>Ng', ng'</b>	[ŋ], ng en "sing"	<b>Ng'ombe</b> (bovo)	Mango (embe)
<b>Ny, ny</b>	Proksimuma sono : "nj"	<b>Nyota</b> (stelo)	Panjo (mama)
<b>Sh, sh</b>	[ŝ]	<b>Shule</b> (lernejo)	Ŝi (yeye)
<b>Th, th</b>	[θ] Proksimuma s	<b>thelathini</b> (30)	-

La literoj **dh**, **th**, **gh**, **kh** estas hereditaj de la araba kaj estas sufiĉe maloftaj. Malgraŭ ĉio, ni devas ellerni prononci ilin ĝustamaniere:

- **Dh** kaj **th** respondas al la angla "th".
- **Gh** kaj **kh** estas prononcataj de la malantaŭo de la gorĝo.
- La **sh** kaj **ch** korespondas respektive al la "ŝ" kaj "ĉ".
- La **ny** estas prononcata kiel la franca "**gn**" por "agneau= ŝafido". Ĝi venas ofte ĉe la komenco de vortoj: **nyuma** (= malantaŭ), **nyama** (= viando), ktp...
- La **ng'** certe estas la plej malfacila sono. Ĝia ekvivalento estas "-ing" de la angla en la vorto "**singing**". Tiu ĉi sono estas relative malofta.

## 6. LA SILABA KONSONANTO "M":

La silabo **M** korespondas al la klasprefikso **MU-** (Klaso 1 kaj 2) kiu perdis sian vokalon **U**.

Skribo	Ekzemplo	Traduko
<b>Mb</b>	<b>M</b> buyu	baobabo
<b>Mch</b>	<b>M</b> chezo	ludo
<b>Mf</b>	<b>M</b> fano	ekzemplo
<b>Mg</b>	<b>M</b> geni	gasto, fremdulo
<b>Mj</b>	<b>M</b> ji	urbo
<b>Mk</b>	<b>M</b> ke	edzino
<b>Ml</b>	<b>M</b> lango	pordo
<b>Mm</b>	<b>M</b> mea	planto
<b>Mn</b>	<b>M</b> nara	turo
<b>Ms</b>	<b>M</b> safiri	vojaĝanto
<b>Msh</b>	<b>M</b> shahara	salajro
<b>Mt</b>	<b>M</b> toto	infano
<b>Mv</b>	<b>M</b> vuvi	Mallaborema, pigra
<b>Mz</b>	<b>M</b> zungu	blankulo

## B - SILABO, TONA AKCENTO KAJ PRONONCO:

**La silabo** en la svahila laŭdire estas malferma, kaj finiĝas per vokala sono.

**Ekzemple :**

Ki-swa-hi-li (= la svahila), m-zu-ngu (= blankulo).

ng'o-mbe (= bovino), n-ne (= kvar), Ta-nza-ni-a (= tanzanio),

**La tona akcento** (la plej akcentita parto de la vorto) preskaŭ ĉiam falas sur la antaŭlasta silabo de la vorto, kiel en Esperanto.

## EKZERCO

### 1: Legu la sekvajn vortojn laŭte:

- A. Kaa, taa, saa, njaa, maana, chai, yai, zaidi, faida, sauti, mzee, nyeupe, nyeusi, njia, kiumbe, kuaa, kuzoea, choo, njoo, jogoo, shikamoo.
- B. Wewe. dawa, bwana, kiswahili, ya, yao, yeye, mayai, bado, bata, barabara, dada, duka, baada, kufaa, afya, hapa, hodi, sahihi, jembe, jibu, kaka, kukaa, haraka, kidogo, lakini, muwa, mamlaka, naam.
- C. Chui, cheo, chafu, chache, dharau, fedha, dhahabu, shughuli, lugha, ng'ambo, ng'ombe, nyuma, nyota, nyoka, shida, shilingi, shule, safisha, hadithi.
- Ĉ. mbwa, mjinga, mhindi, mfalme, mchezo, mji, mkate, mlima, mpaka, msaada, mstari, mzungu.
- D. Tafadhali, magharibi, mashariki, nywele, kuchemsha, mchanganyiko, thelathini, mgonjwa, maharagwe.

## Anoncoj pri korespondpeto

■ Mi nomiĝas Miriam Alliance, 19-jara kantistino. Mi loĝas en Rutshuru, Norda Kivuo en la oriento de DR Kongo. Mi eklernis Esperanton en 2023, en la klubo de Joel Muhire, Rondo Esperantista de Kiwanja, REK. Mi deziras korespondi por konatiĝi kun aliaj esperantistoj kaj plibonigi mian Esperanton. Mi ŝatas kanti, naturon kaj Esperanton.  
Retadreso: [alliancemiriam@gmail.com](mailto:alliancemiriam@gmail.com)



■ Mi estas Jolie Bazirake kaj mi havas 17 jarojn, mi estas el Rutshuru, sed mi ĵus venis ekloĝi en Goma por studi. Mi komencis lerni Esperanton en 2018 en la klubo Rondo Esperantista de Kiwanja. Mi deziras praktiki kun vi Esperanton.  
Retadreso: [jolie.baz@gmail.com](mailto:jolie.baz@gmail.com)





## NEKROLOGO

La konga e-movado estis denove frapita de abrupta forpaso de granda homo, s-ro Jean Bosco Malanda Lutete, la eksa prezidanto de la Landa Asocio, DKEA, la 26an de Julio 2024. La entombigo okazis sabate la 17an de Aŭgusto 2024, en Mbanza-ngungu, Centra Kongo. La tuta esperantistaro kondolencas al liaj familianoj



Augustin Momba Kuluba forpasis la 29an de Aŭgusto 2024, neatendite ĉar li ellitiĝis tiutage bonsana kaj forpasis mistere ĉirkaŭ tagmezo. Li estis esperantisto ekde 2000 kaj agadis en la esperantomovado kiel instruisto kaj estis kunordiganto de la Esperanta Civito, en Uvira, Suda Kivuo. Ni kondolencas liajn familianojn !



## Konga Espero:

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*

Redaktoro : Joel Muhire, Kongolanda ILEI-sekciestro.

Kontakto: [joelmuhire0@gmail.com](mailto:joelmuhire0@gmail.com).

Kontrolleganto : Espoir Kasati.

Kontribuis al ĉi tiu informilo: Joel Muhire, Espoir Ngoma Kasati, Honoré Sebuho, Malekera Bonne Idée, Pastoro Bukuru Nabahena kaj J.D. Kikako.

Karaj legantoj, mi petas vin monsubteni la redaktoran laboron pere de UEA-konto: *jmhr-a* kun mencio : Konga stelo aŭ mobila mono : +243977643030.



# Panoramo pri la 109a Universala Kongreso de Esperanto, en Tanzanio

